Internaciaj Ekzamenoj
**Parola parto**

Specimeno
**Elementa nivelo**

Poentoj: 50 Sukceslimo: 60% Tempodaŭro: 15-20 minutoj
La kandidatoj estas ekzamenataj unuope.

## 1. Bild(stri)o

*La kandidato ricevas bild(stri)on kaj devas klarigi la situacion prezentatan tie.*
*La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj. (Por blinduloj troviĝas objektoj prezentantaj unu ideon aŭ okazaĵon, ekz. butikon, oficejon, feston. Eblas ankaŭ fari rakonton laŭ kasedaj sonoj.)*

Rigardu la bildon kaj klarigu, kio okazas. Estu preta respondi demandojn de la ekzamenanto.



(15 poentoj)

## 2. Esperanto-kulturo

*Laŭ hazardo oni elektas por ĉiu kandidato po du demandojn el listo simila al la suba. La kandidato devas respondi ilin dum maksimume kvin minutoj. Por taksi la respondojn la ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.*

a. Klarigu la sekvajn akronimojn kaj informu pri du el ili: TEJO, UEA, JD, KSM.
b. Menciu almenaŭ 2 gravajn UK-ojn en la historio de Esperanto kaj klarigu kial ili estas gravaj.
c. Kion signifas por la esperantistoj la jaroj 1887, 1905, 1917?
ĉ. Nomu du verkojn de KALOCSAY kaj donu informojn pri lia vivo.
d. Nomu Esperanto-romanon, kiun vi laste legis kaj diru la nomon de ĝia aŭtoro. Priparolu la enhavon.
e. Kion vi scias pri ZAMENHOF kiel verkisto?
f. Kiuj prilingvaj verkoj estas konataj al vi? Menciu almenaŭ tri.

(25 poentoj)

## 3. Interparolo

*Por testi la kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas respondi demandojn kaj interparoli kun la ekzamenantoj pri du el la sekvaj temoj, hazarde elektitaj, dum tri aŭ kvar minutoj.*

a. Priskribi la laboron (studojn).
b. Tipaj pladoj de via regiono (lando).
c. Via unua Esperanto-Kongreso.
ĉ. Kion vi faris en viaj lastaj feritagoj?
d. Via preferata aŭtoro (Esperanta aŭ ne).
e. Preferataj sportoj.
g. Turismaj allogaĵoj en via regiono.
ĝ. Viaj pensoj pri ekologio kaj naturprotektado.
h. Via hobio.
ĥ. Tipaj fruktoj kaj legomoj en via lando.

(10 poentoj)